

la informilo

ISSN:
0291-
6037

INFORMBULTENO  PRI ESPERANTO

bulletin bilingue d'information sur l'espéranto

eldonisto:

KULTURA ESPERANTO-FEDERACIO DE ORIENTA FRANCIO

FEDERATION CULTURELLE FRANCE-EST POUR L'ESPERANTO

MAISON DES JEUNES ET DE LA CULTURE Ph.DESFORGES

27, Rue de la République, F-54000 NANCY


PCK - CCP: 1997-72 W NANCY

NOUVELLE SERIE

trimestriel

3^{ème} trimestre 1990

N° 71




ABONNEMENT

un an: 45 FF

jara abono

por eksterlando:
57 FF aŭ 15 R.K°j

ANTO - FLASH... ESPERANTO - FLASH... ESPERANTO



"GRESILLON"
centre international
de culture
espérantiste

Opportunément située dans une des plus belles régions de France, à proximité des célèbres Châteaux de la Loire, jouissant d'un climat agréable, la Maison Culturelle des Espérantistes Français près de BAUGE accueille chaque année, surtout en période estivale, un public espérantophone diversifié.

Comme au "Kultura Esperanto-Centro" de La Chaux-de-Fonds en Suisse, on peut y pratiquer des activités variées dans une ambiance typiquement internationale.

C'est ainsi qu'en juillet se sont déroulés des stages linguistiques multineaux sanctionnés -pour les "étudiants" volontaires- par les examens officiels de l'Institut Français d'Espéranto.

Parmi d'autres candidats surpris par notre objectif près du grand parc entourant le Château, Mireille Dillenschneider et François-Xavier Gilbert du Club d'Espéranto de BAR-le-DUC, heureux lauréats de "l'Atesto pri Kapableco" (examen de 3^{ème} degré). Toutes nos félicitations!



Pour des raisons techniques, le texte de l'importante résolution votée à l'issue des travaux du Congrès National d'Espéranto de BLOIS en juin dernier n'a pu paraître dans le n° précédent de "La Informilo". En voici le texte intégral (à exploiter)

RESOLUTION

Réunis à BLOIS, les 1er, 2, 3, et 4 juin 1990, les délégués au 82ème Congrès de l'Union Française pour l'Espéranto, dont le siège se trouve 4bis rue de la Cerisaie, 75004 Paris

-ONT SUIVI avec intérêt les efforts déployés par le Ministre de l'Education Nationale au cours de l'année scolaire 1989-1990 pour inciter les jeunes des écoles élémentaires à étudier, en vue de leur avenir européen, une autre langue, à côté de la langue française.

-ONT NOTÉ, en se gardant toutefois de porter un jugement prématuré sur les expériences en cours, la disproportion entre les résultats obtenus et les moyens mis en oeuvre.

-ONT DEPLORÉ l'apparition de nouvelles inégalités créées par le fait que, faute de moyens suffisants, de nombreuses écoles sont exclues de cette initiative.

-ONT REMARQUÉ l'extension continue du privilège consenti à l'anglais, sans réciprocité de la part des Britanniques pour l'étude du français.

-SE FÉLICITENT par ailleurs des résultats obtenus grâce à l'Espéranto, à tous les niveaux des enseignements:

-dans les écoles élémentaires où l'initiation à cette langue contribue à l'approfondissement de la langue d'origine et ouvre la voie à l'étude de langues différentes.

-dans les collèges où l'utilisation de l'espéranto éveille la curiosité aux cultures du monde entier et ouvre tôt les possibilités de la correspondance internationale et des voyages hors des frontières linguistiques.

-dans les Universités qui peuvent fournir, dès maintenant, des cadres pour l'enseignement, notamment l'UFR Clermont 2, riche de 20 années d'étude et de recherche consacrées à l'espéranto.

-S'INDIGNENT de la discrimination dont l'espéranto est l'objet dans l'enseignement en France, malgré sa contribution à la tolérance et à la compréhension entre nations et races, dans l'esprit de la résolution de l'UNESCO (Sofia 1985)

-INSISTENT auprès des instances gouvernementales et administratives

-pour que soient reconnues, soutenues, intensifiées et officialisées les expériences individuelles et volontaires concernant l'utilisation didactique de la langue espéranto.

-et qu'en particulier soient effectivement prises en considération les demandes réitérées des étudiants et de leur professeur de l'Université Blaise Pascal (Clermont 2)

-à savoir

-reconnaissance ministérielle de la langue espéranto à égalité statutaire avec les autres langues à option proposées dans l'enseignement supérieur et secondaire.

-création ou transformation d'un ou plusieurs emplois d'enseignants, à l'Université Blaise Pascal, en vue de l'enseignement de cette discipline.

-PROPOSENT enfin que des enseignants spécialement entraînés initient leurs collègues pour permettre sans délai l'utilisation propédeutique de l'espéranto en vue d'une meilleure approche ultérieure des langues.

LA LETTRE DE L'ESPERANTO

NOUVELLE ASSOCIATION ROUMAINE : lors de son premier congrès après la dictature, la Roumanie a élu un nouveau Bureau pour 3 ans. Le siège de Rumana Esperanto-Asocio se trouve désormais à Timisoara . A partir de septembre l'espéranto peut être enseigné à l'université, dans les grandes écoles ou les IUT; une vingtaine de personnes ont réussi l'examen qui leur permet d'enseigner la langue .

BIENVENUE A BERGEN (NORVEGE) : c'est dans ce port qu'aura lieu le 76ème congrès universel d'espéranto . En attendant, la ville a préparé une cassette-video pour faire la promotion de la ville et attirer les touristes .

☆

ECOLE NORMALE A SZOMTHBATELY (Hongrie): alors que la France supprime les écoles normales, la Hongrie prépare ses futurs enseignants d'espéranto en assurant leur formation à l'Ecole Normale de Szomthately dès la rentrée de septembre .

BIBLIOTHEQUE DE PRET AU BRESIL : elle a été fondée à l'initiative de jeunes Brésiliens pour aider les enseignants d'espéranto en leur fournissant à domicile du matériel pédagogique, dictionnaires, manuels, livres de lecture . Pour l'aider à grandir, dons en espèces ou en nature sont les bienvenus . Contacter UFE .

☆

LES RACINES CHRETIENNES DE L'EUROPE : du 7 au 11 septembre les catholiques italiens ont planché sur ce thème lors de leur congrès à Foligno .

VACANCES ET TRAVAIL A SETE : après le succès de la semaine en Savoie, où une soixantaine de personnes étaient venues en famille apprendre ou pratiquer l'espéranto tout en se reposant, ceux qui préfèrent la mer retrouveront le même emploi du temps et la même ambiance chaleureuse à Sète du 15 au 22 septembre . Renseignements : 67 54 15 43 .

☆

BERLIN EN FORET : du 7 au 16 septembre une rencontre près de Hanovre réunit les amis de la forêt . Car les événements à Berlin ont rendu nécessaire un bulletin régional d'informations, cette rencontre se combine avec une conférence européenne à laquelle sont conviés les rédacteurs de bulletins locaux d'information en espéranto .

FETES DES ASSOCIATIONS : vous trouverez tous renseignements à Albens (73) les 8 et 9 septembre, au Perreux (94) le 15 septembre, à Thionville (57) le 23 septembre à Choisy le ROI (94) les 29 et 30 septembre .

☆

PELERINAGE A CZESTOCHOWA : du 5 au 15 août les catholiques espérantistes se sont associés au traditionnel pèlerinage, vieux de 300 ans , à la Vierge Noire de Czestochowa. Une autre occasion pour voir de près les changements et les difficultés en Pologne .

☆

UNIVERSITE DE SAN MARINO : du 1er au 10 septembre l'université de San Marino qui a accepté de délivrer ses diplômes en espéranto abrite la 7ème session de AIS (Académie Internationale de San Marino) . Une pléiade d'universitaires de tous pays donnent leurs cours en espéranto à des étudiants dont certains ont suivi un cours intensif préalable .

DE NOUVEAUX PROFESSEURS : lors de la Conférence Internationale de la Ligue des Enseignants Espérantophones à Hanabilla (Cuba) un groupe d'enseignants s'est spécialisé pour enseigner l'espéranto par la méthode directe Cseh dans les pays qui n'ont pas encore de structure ou de corps enseignant . Les professeurs étaient polonais et bulgares, les nouveaux diplômés viennent d'Argentine, de Cuba, du Brésil et du Zimbabwe .

Cet excellent article de Jacques FILLEUL est paru dans le numéro de juin d' "Espéranto-Actualités", supplément habituel de "FRANCA ESPERANTISTO (organe informatif de l'Union Française pour l'Espéranto). Nous pensons que nos lecteurs pourront y trouver à nouveau matière à faire réfléchir leurs amis ou connaissances partisans du "polyglottisme" européen...

***** AMOUR, DELICE et ORGUE *****

L'étranger qui apprend le français aura entendu louer la clarté et la logique de la langue de Descartes. Mais...

... mais il devra renoncer à comprendre pourquoi, dans le mot si simple „saisons”, les trois „s” ont chacun une prononciation différente, pendant qu'aucune des quatre autres lettres ne se prononce comme le lui a appris l'alphabet;

... mais il devra mémoriser que la lettre „g” a 4 prononciations différentes, et la lettre „e”, 6;

... mais il devra se résigner à écrire „banque” et „bancaire”, „places assises” et „places debout”, se persuader que les trois mots qui constituent le titre de cet article sont masculins au singulier, et féminins au pluriel; se rappeler que „un voile” et „une voile”, ce n'est pas la même chose;

... mais il devra distinguer 21 possibilités différentes pour former le pluriel des noms (cf. Petit Larousse, article „nom”);

... mais il devra se familiariser avec trois groupes de verbes présentant des conjugaisons différentes, sans parler des auxiliaires „être” et „avoir” dont chacun, au présent de l'indicatif, offre six formes verbales distinctes;

... mais il devra, pour faire connaissance avec la famille bovidée, retenir 5 mots totalement hétérogènes: bœuf, vache, veau, génisse, taureau (et que dire du sanglier, de la laie et du marcassin?);

... mais il devra éviter de se demander pourquoi tous les mots de la famille de „char” ont 2 „r”, sauf „chariot”... pourquoi le participe passé conjugué avec l'auxiliaire „avoir” s'accorde avec le complément direct... si celui-ci est placé avant...

S'il apprend l'anglais, on lui aura dit que, thanks God! la grammaire en est beaucoup plus simple. Mais il devra apprendre par cœur et sans renâcler le présent, le prétérit et le participe de 170 verbes irréguliers, ce qui représente 510 mots n'obéissant à aucune logique décelable.

Quant à comprendre l'anglais parlé, il lui faudra perdre cet espoir s'il n'a pas investi une petite fortune dans plusieurs séjours linguistiques en Angleterre; ce qui d'ailleurs ne l'avancera guère s'il met le pied sur le sol américain...

S'il apprend l'allemand, il lui faudra se familiariser avec les conjugaisons fortes et les conjugaisons faibles, avec les déclinaisons de l'article, des pronoms et des deter-

minatifs, les divers pluriels avec ou sans inflexion, sans oublier les exceptions aux diverses règles...

Comment s'étonner après cela, devant tous ces traquenards, toutes ces complications gratuites, injustifiables, imposées par l'évolution anarchique des langues au cours des siècles, comment s'étonner que l'on puisse proclamer l'Espéranto de 4 à 5 fois plus facile à apprendre que toute langue nationale?

Son alphabet comprend 28 lettres dont chacune a toujours le même son, et n'est jamais muette; de sorte qu'au bout d'une heure d'assimilation de ces 28 sons, l'espérantiste peut prononcer définitivement tous les mots de la langue, donc comprendre et être compris de n'importe quel espérantiste du monde entier.

En 3 secondes il saura mettre au pluriel, une fois pour toutes, les noms et adjectifs, en leur ajoutant la lettre „j”.

En 30 secondes il saura conjuguer tous les verbes au présent (en ajoutant „as” à la racine), au passé („is”) et au futur („os”); avec la même forme pour toutes les personnes, le pronom sujet suffisant à distinguer celles-ci.

En 5 minutes il aura assimilé la conjugaison composée avec l'auxiliaire „esti” (être), ce qui lui permettra de nuancer le discours à l'extrême par l'exacte propriété des temps employés.

En une minute il saura nommer la tribu bovidée, par l'emploi de la racine „bov-” et d'un affixe approprié:

bovo (bœuf),
bovino (vache – in: féminin);
bovido (veau – id: le petit, le descendant);
bovidino (génisse – id + in);
virbovo (taureau – vir: le mâle).
De même pour:
apro (sanglier);
aprino (laie);
aprido (marcassin);
apridino (???)...

la langue française reste coite, elle n'avait pas prévu que le petit du sanglier puisse être du sexe féminin.

Une fois balayées les difficultés de la prononciation, une fois balayées les difficultés grammaticales, compte tenu de ce qu'aucune règle n'a d'exception, la seule difficulté restant pour l'apprentissage de l'Espéranto – et pratiquement elle absorbera tous les efforts de l'élève – est l'acqui-

sition du vocabulaire: apprentissage des racines et des mots dérivés soit par l'agglutinement d'autres racines, soit par l'ajout de préfixes et de suffixes qui en adaptent le sens (système très proche du chinois, et c'est peut-être pourquoi l'Espéranto, quoique basé essentiellement sur des racines romano-germaniques, connaît une faveur particulière en Extrême-Orient). C'est là l'essentiel du travail d'apprentissage de la langue.

Donnons-en un exemple particulièrement significatif. A partir de la racine „vid-” (idée de voir), on peut former:

vidi (voir);
vido (vue);
vida (visuel);
vide (visuellement);
vidu (voyez);
vidajo (la chose vue);
videbla (visible);
nevidebla (invisible);
videbligi (rendre visible);
vidinda (digne à être vu);
videnda (qu'il faut voir);
vidindaĵo (curiosité – chose à voir);
videmo (curiosité – tendance à voir);
antaŭvidi (prévoir);
antaŭvidema (prévoyant);
ekvidi (apercevoir);
intervidiĝi (avoir une entrevue);
retrovida (rétrospectif);
retrovidilo (rétroviseur);
travidebla (transparent);
unuavide (à première vue)...

etc. etc. la liste n'est pas exhaustive.

Rien d'étonnant donc qu'il ne faille par exemple à un Français que 500 heures pour apprendre l'Espéranto, alors qu'il lui en faudra:

1500 pour apprendre l'anglais;
2000 pour apprendre l'allemand;
1000 pour apprendre l'italien;
2000 pour apprendre le néerlandais;
2000 pour apprendre le danois;
2000 pour apprendre l'irlandais.

(chiffres établis par l'Institut de Cybermétique de Paderborn, RFA).

500 heures pour se donner le moyen d'une communication libre, directe et fraternelle avec des hommes du monde entier, le jeu n'en vaut-il pas la chandelle?

Jacques Filleul

En via aŭtomobilo troviĝas pli de Bosch ol vi supozas. ...ET ESPERANTO

COMMERCE....

...ET ESPERANTO

Pour un commerçant, comment ne pas être intéressé par l'idée qui a donné naissance à l'espéranto -faire communiquer les hommes plus facilement-. La communication des idées a toujours présidé à l'échange des marchandises. En effet comment connaître les besoins les goûts, sans pouvoir s'expliquer avec précision? A l'origine le commerce était basé sur le troc et nécessitait donc un double échange entre les partenaires. L'appréciation de la valeur fait encore aujourd'hui l'objet de longues discussions, de même que la fixation des conditions de vente, de livraisons. La capacité à se comprendre apparaît donc comme déterminante dans l'acte commercial le plus simple soit-il.


Qui ne se souvient avoir fait des emplettes dans un pays de langue non connue et avoir dû essayer, à grands renforts de gestes et de mimiques, de se faire comprendre pour trouver à son goût la forme, la couleur, le prix de l'objet recherché.

A travers les âges, les nations commerçantes ont été celles qui avaient la capacité à assimiler la langue locale ou à imposer leur propre langue aux pays visités. Cette évolution linguistique s'est faite souvent au détriment des cultures des ethnies dominées et l'on a pu assister à l'agonie et à la disparition de nombreuses langues, submergées par la colonisation. Et ceci s'est fait, non seulement la plupart du temps dans le sang et les larmes, ce que doit réprouver tout être humain, mais aussi au prix de dépenses financières conséquentes, et ceci pour un commerçant est à prendre en compte. Dans ces deux optiques, l'Espéranto apporte une solution! Enseigné parallèlement à la langue maternelle de chacun des peuples, il devient la langue d'échance par excellence de tous et par-là même protège toutes les langues vivantes contre la suprématie commerciale d'un pays. Mais dans cette hypothèse, l'espéranto devient la langue du commerçant, la langue du négoce international.

Et la question se pose: l'Espéranto est-il adapté?

Comment le savoir puisque jusqu'ici il a été quasiment réservé aux échanges de caractère privé: rencontres, littérature, poésie, voyages, réunions amicales. Il fallait donc procéder à une expérience en grandeur nature. C'est ainsi qu'est née l'Association pour l'usage de l'Espéranto dans le Commerce et l'Economie: INTERNACIA, KOMERCA KAJ EKONOMIA FAKGRUPO - I.K.E.F.

C'est à l'occasion d'un d'un congrès universel que cette idée est discutée entre quelques-uns. Pendant un an, elle se développe et intéresse une vingtaine d'espérantistes dont l'activité professionnelle touche de très près le commerce et l'économie. Lors du Congrès Universel de UEA, à AUGSBURG, en 1985, ils décident de fonder une association: IKEF.



(à suivre)

F.-X. GILBERT
Directeur de la CCI de la Meuse

Tio estas certa:



De plus en plus d'entreprises n'hésitent pas à traduire leur publicité en espéranto.

- | | | |
|---|----------------------------|-------------------------------|
| Aerfiltrilo | Karburajfiltrilo | Sparkdistribuilo |
| Alarminstalaĵo kontraŭ ŝtelo kun gardo de l'internaĵo kaj radoj | Kontrollampo | Sparkiloj |
| Alternatoro trifaza | Kontraŭnebulaj reflektoroj | Sparkilŝtopiloj |
| Anteno | Malantaŭa viŝilo | Sparkokontaktiloj |
| Antaŭglaca akvumilo | Numerplata lampo | Startbaterio |
| Aŭtoradio | Oleofiltrilo | Ŝtartigilo |
| Avertlumŝaltilo | Porlabora lampo | Ŝaltilo |
| Bremslampo | Proksimecaj lumjetiloj | Transistora sparkilo |
| Direktindikiloj | Reguligomotoroj | Ventolilmotoro |
| Distancaj lumjetiloj | Relaĵoj | Ventilo |
| Fanfarilo | Retroreflektoro | Viŝilframetoj kaj viŝilbrakoj |
| Hupo | Sekuriga kontaktoŝkatolo | Viŝilmotoro |
| Interna lampo | Sparkbobeno | Viŝintervalŝaltilo |
| | | V-rimeno |

Ĉu oni diras al li, ke li rapide povas lerni Esperanton.



(1)
Est-ce qu'on lui dit qu'il peut apprendre rapidement l'espéranto?

kaj plie... ĝin perfekte paroli!..



(2)
et de plus le parler parfaitement!



Ĉagreniĝis la redaktoro de "La Informilo" pro malhavo de informoj pri la U.K^o 1990... Feliĉe trafis lin ĝustatempe "ESPERANTO-AKTUELL", la elstara organo de Germana Esperanto-Asocio, el kiu li senhonte "ŝtelis" la detalplenan raporton de Wolfgang Schwanzer. La redaktoro profitas la okazon por emfazi pri la multfaceta valoro de la germana bulteno, kiu tutcerte interesus niajn legantojn. Redaktita 90% en E^o ĝi aperas 8-foje dum la jaro. Abonprezo: 24 DM. Nepre rekomendinda!

Elstara 75a Universala Kongreso en Havano/Kubo

Neatendite: prezidento Fidel Castro vizitis la solenan inaŭguron raporto de Wolfgang Schwanzer

Brile mafermiĝis la 75a Universala Kongreso de Esperanto en Havano: en la solena inaŭguro partoprenis la Kuba prezidento Fidel Castro persone. Lia subita apero surprizis ĉiujn ĉeestantojn el la 1614 gesamideanoj el 54 landoj, kiuj en kortuŝa etoso varme kaj longe aplaŭdis. "Ŝajnas al mi, ke eniras la ejon tu, kiu radias energion", jene blindulo trafe esprimis la sentojn de la publiko.

La grandan atenton de la Kubaj popolo kaj registaro montris ankaŭ la parolado de la Alta Protektanto, d-ro Carlos Rodriguez, vicprezidanto de la Ŝtata kaj Ministra Konsilio. Li dankis la Esperantistojn, ĉar ili fidis al Kubo, ke ĝi ofertas taŭgan etoson por gastigi tiom altan ideon de instigo al amikeco inter homoj kaj popoloj. Li promesis, ke ĉie la gastoj trovos amikan ridon, popolan gajecon kaj varman amikan akcepton, kvankam ekzistas zorgoj de minacata kaj atakata popolo. Kaj vere li pravis!

Ĉar preskaŭ ĉiuj kongresanoj unuafoje vidis tiun landon, denove montriĝis la valoro de Esperanto. Granda nombro da Kubanoj partoprenis en la kongreso, kaj ili ebligis en amikeca babilado interesajn informojn pri sia lando. Multaj gastoj estis surprizitaj pri la atingoj de la socialaj sistemoj kaj pri la politika subteno por Fidel Castro, ĉefe tiuj, kiuj spertis grandegajn politikajn ŝanĝojn en siaj landoj dum la lastaj monatoj.

Kvankam kaj la lando kaj la klimato invitis turismumi kaj sunumi sin, la kongresanoj ankaŭ diligente laboris. Jen kelkaj eroj el la ampleksa programo:

D-rino Jane Edwards gvidis tra la kunsidoj pri la kongresa temo "Esperanto, evoluo, kultura diverseco", dum kiuj estis pridiskutataj la rilatoj de (ekonomia) evoluo kaj danĝeroj por la kultura diverseco. Dum simpozio pri "Evoluo en la latinamerika kunteksto" partoprenis ankaŭ ne-Esperantistaj fakuloj el Kubo.

Proksime al la kongresa temo estis la kunveno de la Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj, kies prezidanto Uwe Joachim Moritz memorigis la averton de Fidel Castro, ke la jaro 1992a ne estos okazo de jubileado, sed de funebro pro la malbono, kiun Eŭropanoj portis antaŭ 500 jaroj al Ameriko.

Grandan sukceson havis la jam tradicia Kongresa Universitato sub rektoreco de prof. d-ro Helmar Frank; eĉ eksteren, ĉar kelkaj sciencistoj, inter ili ankaŭ d-ro Werner Bormann, estis invitataj, prelegi en universitato aŭ aliloke en Havano al Kubaj samfakuloj.

La kunvenoj de multaj fakaj organizoj, ekzemple la komisiono pri virina agado (gvidis Elisabeth Bormann), Esperantista Verkista Asocio, fervojistoj (IFEF), sciencistoj (ISAE), medicinistoj (UMEA), bahaanoj (BEL), blinduloj, artistoj kaj aliaj montris la vastan enradikiĝon de Esperanto en la strukturoj de la homa socio.

Temis ankaŭ pri Esperanto dum la kongreso: sub gvido de prof. d-ro Humphrey Tonkin okazis la 12a Esperantologia Konferenco, en kiu prelegis kaj diskutis Elena Sevĉenko, Rüdiger Eichholz, Otto Prytz kaj d-rino Ilona Koutny, i.a. pri la uzo de la termino "perestrojko" aŭ de ties traduko "rekonstruado".

Kaj ankaŭ la organoj de Universala Esperanto-Asocio (UEA) laboris. La estraro kaj la komitato plurfoje kunvenis. La komitato novelektis Osmo Buller (Finnlando) kiel Direktoron de la Centra Oficejo en Roterdamo kaj la junan Anglan juriston Ian Jackson kiel Ĝeneralan Sekretarion de UEA.

Vere laboregi devis prof. d-ro Johns Wells. Li partoprenis en maratoneto (3 km) kaj venkis eĉ la Kuban atleton kaj trifojan olimpikan ĉampionon Carlos Juantorena, kvankam tiaj taskoj kutime ne apartenas al la devoj de UEA-prezidanto, kiel Wells komentis poste.

En rezolucio la kongresanoj "bonvenigas la iniciaton de UNESKO, lanĉi la Jardekon de Kultura Evoluigo".

Abundis distraj kaj kulturaj programeroj. Bulgara Esperanto-Teatro sukcese prezentis la spektaklon "Mi ne plu konas vin". Dum nacia vespero la gastoj ĝuis erojn de la Kuba muzika kulturo. La Jugoslava duopo Vida Jerman kaj Saša Pilipovic prezentis poemojn de la plej elstara Kuba poeto de nuntempo, Nicolas Guillen.

En la Nacia Biblioteko "Jose Martin" okazis ekspozicio de libroj kaj revuoj en Esperanto. Nome de Germana Esperanto-Asocio Inge Simon transdonis "Maks kaj Morits" kiel ekspoziciaĵon.

Neforgesebla estas la oficiala akcepto en la Palaco de la Revolucio, kie ĉefkomandanto Fidel Castro mem bonvenigis ĉiujn 150 invititojn per manpremo.

Esperantistoj invadis la Golfon de la Porkoj

46a Internacia Junulara Kongreso en Playa Girón/Kubo
raporto de Marko Lins

En tosto *Castro* montris, ke li bone komprenis la signifon de Esperanto: "Kiam vi eniris, mi vidis tiun knabineton, kaj mi demandis al ŝi: 'Ĉu vi estas Vjetnamanino?', kvankam mi neniam vidis Vjetnamaninon kun bluj okuloj. 'Ne', ŝi respondis, 'mi estas filino de Japanino kaj Svedo.' Jen la vera signifo de Esperanto: malantaŭ Esperanto estas la amo."

Ĵurnaloj, radio- kaj televid-stacioj raportis pri tiu altranga aranĝo. Ankaŭ dum la kongreso ĵurnalistoj svarmis tra la ejo. La tuta lando sciis pri la kongreso en Havano. Kuba Esperanto-Asocio povas esti ege fiera pri tiu granda rekono de siaj meritoj.

Dum duon- kaj tut-tagaj ekskursoj kongresanoj interalie ekkonis la malnovan urbocentron de Havano, vizitis cigarfabrikon, ĝuis la fabelan paradizon de varietea kabaredo *Tropicana* aŭ naĝis ĉe la famkonataj plaĝoj de Varadero. Post la kongreso multaj restis pli longe en tropika Kubo por partopreni aŭ en la junulara kongreso en *Playa Girón* aŭ en la Konferenco de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj en la bela montara urbeto *Hanabanilla*. Kelkaj vojaĝis tra la lando, ĉu per turisma karavano ĉu per luaŭto, ĉiam estis interese kaj iom aventurece, ĉiam oni spertis la varmajn korojn de la Kubanoj.

Post Braziljo kaj Pekino tiu ĉi kongreso nun estis la tria, kiu okazis en tielnomata evolulando. Konsiderante tion, estas konstateble, ke la kongreso estis ege sukcesa kaj ke Esperanto nun vere ektutmondiĝas. Al Eŭropanoj tiuj kongreŝoj donis multajn eblecojn, sperti aliajn sintenojn al la vivo kaj aliajn mondpolitikajn vidpunktojn. Tiu interŝanĝo de ideoj kontribuas al tutmonda konscio pri la diverseco de kulturoj kaj pri komuna respondeco por la homara estonto.

EK DE NUN NIAJ LEGANTOJ HAVAS LA EBLECON ALIĜI AL LA VENONTA U.K° 1991, KIU OKAZOS EN LA BELA NORVEGA URBO BERGEN (ALIĜILO EN ĈI-TIU N°),

NI INFORMAS ILIN, KE PRAGO GASTIGOS LA 77AN UK EN 1992... KAJ KE EN VALENCIA OKAZOS LA 78A EN 1993!

La kvaran fojon Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) okazigis la Internacia Junularan Kongreson ekster-Eŭrope, nome en *Playa Girón*, Kubo, kiu situas ĉe la fama Golfo de la Porkoj, kie en 1961 la ekzil-Kubanoj intencis, komenci sian batalon kontraŭ la komunisto registaro. Entute partoprenis pli ol 200 Esperantistoj; post la Kubanoj, kiuj ĉeestis kun 70 gejunuloj, **Germana Esperanto-Junularo** elstaris per la plej granda delegacio. Alveninte la kongresejon, ĉiuj estis bonvenigataj tre kore per Kuba muzikgrupo.

La tre leĝera solena inaŭguro en suna ardo havis sian skandalon, kiam reprezentanto de la junkomunistara partio de Kubo tre polemike kaj demagogie elkriis la sukcesojn de la revolucio, kvankam antaŭ unu semajno multaj Kubanoj fuĝis multnombre en fremdlandajn ambasadojn. Per sia parolado li kontraŭstaris la neŭtralecon de TEJO kaj de Esperanto. Bedaŭrinde, ke kelkaj kongresanoj tamen ne komprenis kaj pro tio eĉ aplaŭdis.

La programo konsistis el ĉiumatenaj prelegoj kaj ekskursoj proksimen. La prelegoj ligitaj al la kongresa temo "Alfabetigo" allogis multajn aŭskultantojn, kiuj distingiĝis per bonaj kontribuoj en la sekvaj diskut-rondoj. La ekskursoj kondukis nin al lokoj tre diversaj. Ĉiutage oni ofertis al la partoprenantoj vizitojn al proksimaj vidindaĵoj (krokodilbredejo *Guama*, indiana vilaĝo, banloko *Kaleta Buena* ktp.). La tuttagaj ekskursoj malkaŝis la belecon, kaj de la fama plaĝo Varadero kaj de la malnova urbo *Trinidad*, fondita jam en 1514, kun amasoj da malnovaj domoj, konstruitaj laŭ Hispana-Kariba-Maŭra arkitekturo. Al kiuj la programeroj ne tro plaĉis, restis la ebloj sportumi, plaĝumi, sunumi sin kaj konstrui sablokastelojn.

Vespere, post ĉiame bonaj manĝoj (eble eĉ tro bonaj, kompare kun tiuj de la Kubanoj) la ejo kaj la kongresanaro estis kaptataj de la unika Kuba etoso. Dum ĉiuj vesperoj Kubaj muzikistoj varmigus la sangon de la gastoj per siaj rapidaj kaj danceblaj ritmoj. Ili ofte ludis i.a. la novan "TEJO-himnon", *La Bamba*. Tia muziko, varmo kaj alkoholaĵoj ebrigiis multajn. *Mojito*, *Cuba Libre*, *Sangria* kaj *Ron Collins* estis nur kelkaj kokteloj rekomendendaj.

Kvankam mi resumas, ke la kongreso estis entute sukcesplena kaj spertiga, restas kiel ĉiam kelkaj malkontentigaj aferoj kiel fuŝa organizado, la malproksimeco de kabanoj kaj kelkaj tro turistecaj programeroj. Espereble, ke tiu ĉi Internacia Junulara Kongreso instigas kaj evoluigas la junularan movadon de Kubo kaj de TEJO. Okazigu ĝin ofte ekster-Eŭrope!

Ni jam aludis la amikajn rilatojn inter la klubo de BAR-le-DUC (55) kaj rumana familio en SIBIU (urbo kiu lastatempe "famiĝis" pro bedaŭrindaj okazaĵoj). Vasile ALBU ĵus sendis al ni informleteron, el kiu ni ĉerpas la sekvantajn liniojn:

"...La 14/15ajn de julio, mi kaj deknaŭ el miaj gekursanoj partoprenis al nia 8a Nacia Kongreso de Esperanto (la unua post 63 jaroj da foresto!) en TIMIȘOARA.

Fakte la unua okazis en 1909 en BUKAREȘTO, la dua en 1922 (CLUJ), la tria (TIMIȘoara) en 1923, la 4a en 1924 (ARAD), la 5a en 1925 (PLOIESTI), GALATI gastigis la 6an en 1926 kaj BRAȘOV invitis la sepan en 1927.

La 8a estis planita en 1929 en SIBIU sed cirkonstancoj malfavoraj (monda ekonomia krizo, faŝismo, dua mondmilito, komunismo) malhelpis okazigi aliajn ĝis nun.

Al nia Kongreso 1990 partoprenis 200 personoj el 20 distriktoj (kie estas organizita E°-agado). Sendis salutleterojn J. WELLS, Prezidanto de U.E.A., Detlev BLANKE el DDR kaj la Bulgara E°-Asocio. En la nomo de la esperantistoj de SIBIU mi transdiris saluton... Estis decidite starigi la sidejon de nia Rumana Esperanto-Asocio en la ĉi-jara kongresurbo TIMIȘOARA. Profesoro Dr° F.I. BOCIORT estis elektita prezidanto kaj elektiĝis plue konsilio kun 28 membroj (mi estis elektita membro en la komisiono pri instruado)..."

Aliloke malkovros niaj legantoj raporton de nia samideano A. GROSSMANN, kiu ĉeestis la Germanan Kongreson kaj bedaŭras la certgrade troan uzon de la nacia lingvo dum la debatoj... Oportune kaj koincide argumentis V. Albu en sia salutparolado en Timișoara:

"...Pardonon mi petas, ke ankaŭ mi parolas al vi ne rumane sed esperante, kvankam multaj kongresanoj ne sufiĉe bone aŭ eĉ neniel komprenas la internacian lingvon. Sed mi opinias, ke en ĉiuj kongresoj de Esperanto, nepre ni devas paroli ne nur pri Esperanto sed ankaŭ per Esperanto, ĉar antaŭ ĉio niaj kongresoj havas instruan kaj edukan signifon... Multaj el niaj samideanoj estas izolitaj, ili neniam havis eblon praktike apliki tion, kion ili lernis; ili ofte dubas, ĉu efektive per Esperanto oni kapablas tute interkompreniĝi... Ĉi-tie ili devas havi eblon aŭskulti spertajn esperantistajn parolantojn, ili per siaj propraj oreloj kaj okuloj devas konvinkiĝi kiel bele kaj flue oni povas sin esprimi en Esperanto. Tiam ili entuziasmiĝos, ili konstatas, ke ili laboras por io vivoplena, tiam ili rehejmiĝos kun nova kuraĝo kaj energio..."

NIA VIVO EN...

BETSCHDORF ☆

Okaze de la salono "Hobbythèque" (bedaŭrinde la organizintoj sin prostituis je la hodiaŭa lingvosnobismo...) Odette SCHEIDEL iniciatis sukcese prezenton de esperanto. Interesiĝis serioze 12 vizitantoj, kiuj havigis sian adreson por eventuala parolokurso en septembro. Nelacigeble Odette anoncis duontagan "staĝeto"-n, kiu logis tri scivolemulojn, la 16an de junio. La 22/24ajn de junio, "Forotri" (FR3, televid-elsendofico) film-esploris la vilaĝon kaj memevidente intervjuis nian samideaninon! Sed ni lasu al ŝi la parolon...

"...parolante dialekte kaj france mi legis leteron el Japanio... Bedaŭrinde, dum la filmado, eĉ pli, estis fortranĉita, ĉefe la trafa prezento de E°, dum kiu oni povintus vidi Dr°n Zamenhof, "Minitel"-on, PKK°-n, bildkartojn, poŝtmarkojn, ktp. Laŭ mi "oni" opiniis, ke estas tro da reklamo(?!). Tamen sekve mi ricevis kelkajn telefonvokojn kun unu serioza petonde plua informo. La elsendo estis ankaŭ spektita... en Germanio!..."



Esperanto?
Ridiculous!!
It's much too easy!

La nova lernjaro rekomenciĝis per kunveno la 12an septembro. Ĉeestis deko da personoj. Okazos 2a-grada kurso jam la 26an de septembro (19a horo) kaj 3a-grada la 3an de oktobro (17a45). Sed la ĉefa afero estas la kurso por komencantoj, antaŭvidita por la 10a de oktobro. La kampanjo por varbado, per afiŝoj kaj prospektoj nun komenciĝas. Pluraj personoj jam montris intereson. Principe ĝi funkcios ĉiumerkrede (kiel lastjare de la 19a ĝis 20a15).

Amiko, dum la pasintaj jaroj, eldonis por ni prospektojn kaj afiŝojn je treege favora prezo. Bedaŭrinde li ne plu povas tion fari kaj la ĉi-jara eldono de prospektoj okazis per fotokopiado. Ĉiu prospekto kostas nun 40 centimojn. Lastjare ni eldonis 3000, sed ĉi-jare ni reduktis la kvanton al 2000. Pro tiu triobligo de niaj elspezoj, ni devis pli altigi ĉiujn kotizojn je 10F (parolajn kaj perkorespondajn). Ni malpli malavare disdonas nun prospektojn, same pri afiŝoj. Restas nur malgranda kvanto, ni trovis "sponsoron", kiu ŝajne pretas financi por ni novan eldonon de 500 afiŝoj sed lastminute gi fiaskis (ĉu provizore?).

SEKVOJ DE LA "BIOLOGIA FOIRO"

En la lasta "Informilo" mi raportis pri partopreno dum majo en la "Biologia Foiro" en NANCY. 10 personoj enskribiĝis por unutaga staĝo. Ĉar ĉiuj ne povis veni je la antaŭvidita dato, mi proponis provlecionon la 30an de majo. Nur... 1 persono venis malgraŭ plia komuniko en gazeto. La staĝon mem la 16an de junio partoprenis nur 1 el la aliĝintoj antaŭaj, kaj 2 aliaj personoj poste varbitaj. Ĉiuj ŝajnis kontentaj kaj interesataj, 1 aliĝis perkoresponde, 2 promesis veni al la oktobra vespera kurso.

PREZENTO DE ESPERANTO EN LA "FESTO DE HOMO, NATURO KAJ ĈIRKAUMEDIO" EN THAON-LES-VOSGES

Tiu festo ĵus okazis la 15/16ajn de septembro. Kun Sr^o Simonnet (Mirecourt) ni decidis partopreni tie por prezenti Esperanton. Feliĉe venis helpo de diversaj personoj (Sr^o Colin el Le Tholy, Sr^o Moitrier el Nancy kaj aliaj). Ni prezentis la ekspozicion de la Federacio, kiu alvenis ĝustatempe el Parizo. Ni havis malfacilaĵojn, ĉar Parizanoj por realigi videofilmon pri ĝi, malmuntis la panelojn por forigi la plaston protektilon (kiu ĝenis por filmi). La paneloj alvenis kompreneble remuntitaj, sed kelkfoje hazarde, tiel ke la stiftoj uzendaj por fiksi la panelojn plurope ofte ne estis uzeblaj... Ni devis improvizi per drato... Unu el la paneloj eĉ estis remuntita inverse, sekve unu flanko ne estis uzebla, ĉar mankis iloj -kaj tempo!- por malmunti denove. Ni tute simple nuligis ĝin, kaŝante ĝin sub afiŝo!...


Malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj la ekspozicio estis belaspekta kaj la organizantoj de la Festo gratulis pro la "profesia" aspekto de nia prezentaĵo... Kelkaj libroj, gazetoj, multaj flugfolioj kaj afiŝetoj akompanis la ekspozicion. Dum 2 tagoj centoj da vizitantoj ĉeestis la eventon (laŭdire oni atendis 2000 la dimanĉon... do eble 3000 entute?). Multaj preterpasis senatente (vidalvide de nia stando estis alia pri protektado de la birdoj, io kio multe pli interesis la pasantojn!). Tamen ni diskutis tre longe kun dekoj kaj dekoj da personoj. Ni informis kompreneble detale pri Esperanto kaj pri eblecoj ĝin lerni. La plej pozitiva rezulto ŝajnas esti 4 personoj el la regiono de Nancy, kiuj promesis veni al nia oktobra vesperkurso. Ni eldonis 600 demandarojn pri la interesoj de la homoj (vespera kurso, perkoresponda, staĝo, sugestoj...) sed la homoj nur malfacile konsentis ilin plenigi. Ni ne volis peze insisti, nur 15 plenumis la "taskon". Aliaj promesis resendi poste. Nur post kelkaj semajnoj ni scios vere pri la rezulto pozitiva aŭ ne de tiom da mono, tempo kaj energio eluzitaj por konigi Esperanton... La tagon post la evento restas granda laceco, gorgdoloro, sento pri vaneco kaj dubo pri rezultoj. Tri personoj anoncis sin interesataj de staĝo en Epinal, 1 en Nancy, 1 en Metz, pluraj pri la perkoresponda kurso. La nombro de interesatoj ne ŝajnas ebligi la starigon de tiuj staĝoj, la interesatoj de PKK^o ne volis aliĝi surloke (malgraŭ prez-redukto) sed promesis sendi la aliĝilon.

Sr^o Simonnet prelegis sabate pri "ESPERANTO, lingvo por paroli kun la tuta mondo". Dudeko da personoj ĉeestis.

J.-P. COLNOT

ANIME PAR Mr COLLIGNON

Langue internationale fondée en 1887, logique, simple, reconnue par l'UNESCO elle est un outil indispensable de l'intercommunication, du dialogue entre les peuples. Venu, Vidu!



Urbeto kun pli ol 30 000 enloĝantoj apud Nancy, VANDOEUVRE vidos nian ekspozicion de la 18a ĝis la 22a de septembro. Kurso gvidata de Alain COLLIGNON komenciĝos tie en MJC de Lorraine, ĵaŭdon la 4an de oktobro, je la 20a30.

Ni notu, ke tiu E°-kurso estas oficiale "agnoskita" same kiel dekoj da aliaj aktivajoj proponitaj al la publiko.

PERKORESPONDA KURSO (P.K.K°)

Dum la ĵus finiĝinta lernjaro ni dissendis al la regiona gazetaro 43 komunikojn pri nia perkoresponda kurso (kaj pri la staĝoj okazintaj) inter kiuj 16 en Nancy mem.

Ni povis kontroli aperon de 23 regionaj komunikoj kaj dekduon da lokaj. Entute petis informojn 116 personoj kaj aliĝis ĝis julio 32 gelernantoj, plus 10 en parola kurso. En 32, 7 ĝis nun finlernis "M11" (6 nomoj jam aperis en "La Informilo"; la lasta estas Sin° LOUIS en Nancy, gvidata de Sr° Greiner. gratulon!). Nur 3 el 7 mendis "M12" por daŭrigi la lernadon, nur 1 el 7 deziris korespondi...

El gelernantoj de la pasintaj jaroj, finlernis M12 -laŭ la informoj, kiujn mi posedas- : Dr° Gérard Patureaux (Metz-Jusy), gvidita de Sr° Greiner (el 14 finlernintoj de M11 en 1987/88).

Sr° Schlewitz (68720 Flaxlanden), gvidita de Sr° Grossmann (el 9 finlernintoj de M11 en 1988/89).

Gratulojn al ili!

En la nuna lernjaro mi jam dissendis 12 komunikojn; ĝis nun aperis ŝajne nur 1, por anonci la PKK°-n, la staĝon en THIONVILLE kaj la prezentadon de E° en THAON. Tri gelernantoj jam aliĝis.

NOVA KOTIZO POR LA PKK°

= por la elementa, per "Metodo 11", la jara kotizo ekde septembro fariĝis 195F kun libro kaj laborslipoj, plus 55F por kasedo... do 250F entute.

= por la duagrada, per "Metodo 12", la jara kotizo estas 130F plus la libro (afrankita) 59F, plus eventuala kasedo 68F (la finlernantoj de M11 en malpli ol 5 monatoj ne pagas la kotizon por M12 -nur la libron kaj kasedon-, kondiĉe, ke ili ne atendu unu jaron por decidiĝi daŭrigi per M12!

= por la triagrada kurso. Per (eventuale) "Por la praktikantoj" (20 lecionoj) kaj ĉefe "Paŝoj al plena posedo" (30 lecionoj, jara kotizo 130F plus la eventuala unua libro 30F plus la 2a libro 70F, plus sendkostoj (ĉ. 20F por ĉiu libro).

= Preparo al "Atesto pri Kapableco". Jara kotizo 130F, plus gvidlibro de A. Ribot (45F afrankite), kaj krome la gelernantoj devas studi diversajn verkojn, kies kono estas necesa por bona posedo de la lingvo.

Ĉiu el la diversaj kotizoj entenas 69F por la Federacio kaj abono al "La Informilo"

UNUA LEGOLIBRO

40 PAŜETOJ

AL PLUA POSEDO

☆☆☆

adaptis: L. LENTAIGNE
(laŭ ideo de: Cl. CAYZAC)

La respondeculo de la PKK°

J.-P. COLNOT

Ce recueil de 40 petits textes a une triple ambition:

1/ Créer dès que possible, chez le débutant, le désir de lire.

2/ Doter le lecteur d'un ensemble d'expressions consacrées.

3/ L'imprégner de cette idée qu'il faut PENSER EN ESPERANTO!

en préparation: 60-minuta kasedo

dulingva!
france dorsflanke!

F-34000 MONTPELLIER

Mendoj: "LAÛTE", F-4740 BEAUVILLE. Specimeno (5 PM): LENTAIGNE, 3 Av. Gaillarde



PLUS DE FRONTIERES CET ETE POUR NOMBRE DE NOS LECTEURS ESPERANTOPHONES!...

EKDE ĈI-TIU N° VI POVOS "FRANDI" VOJAĜNOTOJN EL HISPANIO, SVISIO, GERMANIO, HUNGARIO, AŬSTRIO! EĈ ĜIS SIBERIO FLUGIS DU... TRA LENINGRAD, KIEV, TACHKENT, SAMARCANDE... KIE ILI ESTIS VARME AKCEPTITAJ!

LA K.C.E en LA CHAUX-DE-FONDS (Svisio) ĈIAM ALLOGA! ☆

Mi partoprenis ĉi-somere diversajn aranĝojn de la K.C.E. Ĉar por niaj alzacaj samideanoj KCE situas sufiĉe proksime, eble interesos legantojn de "LA INFORMILO" scii, kion mi faris tie.

En junio estis unusemajna seminario pri la poemego "La Infana Raso" de William AULD. La seminarion gvidis Istvan ERTL, kiu tradukis tiun verkon hungaren, kaj partoprenis Willem VERLOREN van TEMAAT, kiu tradukis ĝin nederlanden, kaj Jean-Pierre DANVY, kiu tradukis ĝin francen. Unu semajno montriĝis nesufiĉa tempo por finstudi tiun verkon!

En julio estis kurso pri la "interna ideo" de esperantistoj. Thomas CHMIELIK el Lublin (Pollando) prelegis pri la evoluo de Zamenhof, de cionismo al hilelismo, kaj poste al homaranismo, restituigante la penson de Zamenhof en la kadron de la rilatoj inter judoj kaj poloj en la tiama rusa regno. Fine de la semajno li montris kaj komentis du videofilmojn el Japanio pri la religio "OOMOTO", kies adeptoj principe devas esti esperantistoj...

Poste estis kurso pri recenz-arto, gvidata de Ed. BORSBOOM. Samideano Borsboom prelegis pri historio de la recenzarto en Esperanto kaj donis konsilon por recenzi esperantajn librojn. Ekzerco montris, ke la kursanoj bone asimilis lian instruon!

Samtempe estis vesperaj prelegoj pri la religia evoluo de Edmond PRIVAT. Claude GACOND prezentis prelegon de Privat pri doktrina libereco kaj sincereco, per kiu Privat iam esprimis sian komprenon pri kvakerismo. Diakonino Marie-Louise MÜNGER prelegis pri Gandhi kaj pri la etoso, kiu regis en La Chaux-de-Fonds en la epoko de Privat. Konkludis la prelegaron Giorgio SILFER parolante pri la rilatoj de Privat al nekristanaj religioj.

Tiuj, kiuj interesiĝas pri la verkoj de E. Privat, sciu, ke fondiĝis en Pollando fondumo, kiu celas reeldoni verkojn de Privat en Esperanto, kiuj ne plu troveblas, kaj aldoni tradukojn en E° de verkoj, kiujn Privat skribis en naciaj lingvoj. Estas antaŭviditaj:

= la reeldono de "Interpopola konduto"

= la eldono en E° de tiu prelego pri doktrina libereco kaj sincereco, pri kiu parolis

Cl. Gacond

= la eldono en E° de du broŝuroj, kiuj estas kompilaĵoj de artikoloj, kiuj iam Privat skribis en franclingvaj gazetoj por defendi la rajton de la pola popolo al sendependiĝo.

Interesatoj sin turnu al la franca delegito: Thierry FLACHON, 9 Rue Léon Nautin, BP 221
420005 SAINT-ETIENNE

laŭ informo de Jacqueline LEPEIX

MIRINDA, LANDA KONGRESO EN HISPANIO ☆

Sant Cugat del Valles kuŝas en Katalunio je kelkaj kilometroj de BARCELONO, kiu iĝas nuntempe giganta konstruego pro la venontaj "Olimpiaj Ludoj". La programo estas rimarkinda; partoprenis 245 gesamideanoj.

Post la festparolado de l'Prezidanto de HEF, Sr° antonio Alonso NUNEZ, la urbestro -kiu estas esperantisto!- salutis nin.

Pluraj fakaj kunvenoj okazis; sekvis prelego fare de Sr° F. BUCHLEY, kies temo estis "60 jaroj da esperantista vivo"... Interesa prelego.

Seminarion pri "esperanta konjugacio" gvidis Sr° Nunez, dufefe du horojn. La lasta parto daŭris ĝis la 3a matene, tiom vigla kaj interesa fariĝis la debato! Sin° GABRIELLI (Italino) prelegis rimarkinde pri la "Vivo de Léon TOLSTOI".

Laŭ la opinio de la kongresintoj, la plej valora, rimarkinda kaj senkompara prelego estis tiu de Sr° Miguel Fernandez MARTIN, titolita "Vivo de Garcia Lorca kaj versio esperanta de ties verkaro". Sr° Martin estas tradukinto de la aludita verkaro. Dufoje du horojn, kiuj fulmrapide flugis, daŭris la prelego. De tempo al tempo la preleganto deklamis poemojn per tiom da veruvo, ke li vivigis la vortojn...

.../...

La aŭskultantoj estis sendube en la "sepa ĉielo" pro la beleco de la poemoj. Li riĉigis la prelegon per esperantigitaj kantoj de la aŭtoro, kiu plie estis muzikisto. Li kantis per tiom varma voĉo propra al mediteraneanoj, ke la aŭskultantoj estis subjugitaj... Ili trinkis la vortojn liel bongustan vinon! Komprenoble Sr^o Martin rapide skizis la vivon de Garcia Lorca, kiu estis mortpafita.

Fine de tiu kultura prezento krakeradis aplaŭdoj el ĉiuj anguloj de la salono. Finfine la preleginto estis devigita kanti lastan kanton en "religia etoso". Ĉiuj gratulis kaj dankis lin pro la valora sekvenco! Kia belega kaj admirinda prelego!

Prelego de Sr^o Luis Gilperez FRAILE temis pri speleologio helpe de lumbildoj... Absorba temo...

En POBLET ni vizitis la faman monaĥejon kaj la esperantistan hispanan muzeon ĵus instalita en Sant Paul d'Ordal. Meze de la urbo SABADELL staras la impresa monumento al Dr^o Zamenhof. Piede de ĝi demetis florgarbego la Prezidanto, dum la ĉeestantoj kantis "la himnon". Ankaŭ la muzeon de la Instituto pri Paleontologio ni vizitis. Dr^o M. GRUSAFONT klarigis al ni la diversajn kaŭzojn, pro kiuj malaperis la prabestoj.

Gitaro-koncerto distris nin tutsame kiel katalunaj folkloraj dancoj. Korusaj kantoj kaj ludoj diversaj finis la vesperojn.

H.E.F. kore salutas la Orient-francan Federacion kaj invitas ĉiujn membrojn partopreni al la UNIVERSALA KONGRESO de U.E.A. okazonta en VALENCIA en... 1993!

laŭ informo de Odette SCHEIDEL

=====AUSTRIO, GASTIGLANDO DE TUTMONDA KONGRESO =====

La 63a Kongreso de S.A.T. (Sennacieca Asocio Tutmonda) disvolviĝis en LINZ (Aŭstrio) de la 4a ĝis la 11a de aŭgusto 1990, kun la partopreno de 290 SAT-anoj el la tuta mondo.

La "Popoldomo" de LINZ akceptis la laborkunsidojn kaj la ege komforta "Somer-Domo" loĝigis la gekongresintojn. Ĉiujn gratulojn al la O.K.K. pro ĝia varmega akcepto kaj pro la perfektega organizado de la kongreso!

Granda novaĵo estis la aktiva partopreno de SAT-anoj el SOVETUNIO kaj el aliaj orient-eŭropaj landoj. Ilia ĉeesto ebligis pli malfermatajn debatojn kun esprimo de la plej diversaj opinioj.

La vesperoj estis plenaj je okupoj: operetkoncerto, internacia balo kaj bunta folkloro "vespero". Kiel premieron, Jerzy FORMAL, profesia aktoro el Varsovio, prezentis al ĉiuj teatraĵon mirindan kaj ege valoran pri "La vivo de MOZART".

Ankaŭ interesa estis la turista malkovro de iu regiono de Aŭstrio dank' al pluraj ekskursoj: urborigardo de LINZ (kromnomo... "La sonanta urbo"), veturo al FREISTADT kaj al KEFERMARKT (proksimaj al Ĉeĥoslovakujo). Aliaj elektis viziton de la fama "koncentrejo" de MAUTHAUSEN. La tuttaga ekskurso veturigis nin al unu el la plej belaj urboj de Aŭstrio, STEYR, preterpasante naturan parkon de GRÜNAU.

Venontaj rendezuoj: BRUSELO en 1991... kaj ĉefe en 1992, kun granda espero de konkretiĝo, en la urbo KAUNAS (Litovio)!

**pour vous initier à la seule
vraie langue
internationale, pour vous perfectionner
ou éprouver le plaisir rare de converser
en espéranto...**



**nos stages, nos congrès,
nos rencontres, nos voyages...**



Catherine ROUX

Ni rememorigas al vi:

6/7ajn de oktobro
F-THIONVILLE

26/28ajn de oktobro
CH-WIENACHT

7/9ajn de decembro
D-HOMBURG

... kaj serio en
CH-La CHAUX-de-FONDS

PASSEN SIE GUT AUF!... KROKODILOJ REAPERAS! *

_____ BONA GERMANA KONGRESO TAMEN... _____

De la 1-a ĝis la 4-a de junio okazis en Frajburgo la 68-a Germana Esperanto-Kongreso, kun la temo: Ekologio ne konas limojn. La bela kaj komforta Kolping-domo de Frajburgo estis ĝia tre taŭga kongresejo, kun salonego kaj diversaj kunven-ĉambroj. Tiu domo ankaŭ funkcias kiel komforta hotelo kaj restoracio. Krome Frajburgo estas bela kaj ĉarma urbo, kiu kapablis evoluigi ekologian vivo-stilon. Granda piedira zono ĉirkaŭas la katedralon en la malnova urbokerno.

Apartan sukceson ĝuis ĉi-tiu kongreso pro la nombro da partoprenantoj el multaj landoj. Entute estis pli ol 250 partoprenantoj, el kiuj unu triono estis el eksterlando. Venis ankaŭ impona delegacio el la itala ĝemel-urbo Bologna.

Interesaj ekskursoj estis programitaj. Sabate okazis la urbo-vizitado tra Frajburgo, kiun lerte gvidis s-ro Renschler. Kaj ni povis mem sperti kiom agrable estas, promeni tra la urbo sen la ĝeno de aŭtomobila trafiko. Ni povis admiri la malnovan urbo-centron, la gotikan katedralon kaj la foirejon ĉirkaŭ ĝi, kun la malvastaj stratetoj kaj multaj mezepokaj vidindaĵoj kaj la ĉiam fluantaj kanaletoj kaj putoj. Dimanĉe okazis 3 duontagaj bus-ekskursoj al Nigra Arbaro, al Alzaco, al Kaiserstuhl (Imperiestra seĝo). Lunde la tuttaga bus-ekskurso montris al ties partoprenantoj la 3 landojn: Germanion, kie ni vizitis Staufen, la historian lokon de d-ro Faŭsto; Svislandon, kie ni povis vidi la urbo-centron de Bazelo kun katedralo kaj urbodomo, kaj la Rejnjon; Francion, kie tra Alzaco ni vizitis la mezepokan urbeton Rouffach kun ĝia cikonio-bredejo.

La kultura kaj amuza vesperoj konsistis el diversaj programeroj: deklamado, kantado, ombro-teatro, dancado, aŭkciado, ktp. Dum la aŭkciado oni eĉ sukcesis vendi la rajton posedi la unuan kongres-numeron por la

venonta Germana Esperanto-Kongreso, okazonta en Munkeno. Komprenoble ĝin akiris iom honore kaj simbole la nuna prezidanto de GEA, d-ro W. Schwanzer kontraŭ pago de pli ol 50 GM. La du sekvantaj numeroj akiriĝis je pli malalta kosto. Ŝajne bona ideo por plenigi kongresan kason.

Komprenoble ankaŭ okazis laboraj aranĝoj, interalie la inaŭguro, salutvortoj, prelegoj pri ekologio, fakkunsidoj kaj la jarĉefkunveno de GEA. Male al la UFE-kongresoj, tiuj programeroj estas du-lingvaj en la germana kaj en Esperanto. Eĉ iuj estis nur en la germana, ekzemple kunsido pri la Esperanto-asocioj en la du Germanioj okazis bedaŭrinde nur germane, tial mi simple rezignis pri ĉeesto. Multaj salutoj kaj paroladoj dum la inaŭguro estis nur en la germana. Feliĉe la preleganto pri ekologio estis nederlandano, tial tamen Esperanto estis uzata. Dum la jarĉefkunveno oni plej multe parolis en Esperanto, tamen kiam venis la financa raporto tiam subite oni aliris al la germana lingvo kvazaŭ Esperanto jam ne taŭgas. Preskaŭ ĉiuj ceteraj debatoj okazis en la germana, nur laŭ la bonvolemo de iuj intervenantoj refoje aŭdiĝis Esperanto.

Jes, bedaŭrinde la Germana Esperanto-Kongreso ne estas la paradizo de Esperanto, kvankam oni ĝoje emfazis, ke triono de la partoprenantoj estas eksterlandanoj. Ĉu tia politiko, dulingva kongreso, estas vera helpo al la komencantoj kaj efika al la eksteraj publiko kaj eminentuloj neglektante la eksterlandajn partoprenantojn? Verŝajne eblus trovi taŭgan solvon per samtempa traduko al la ĵurnalistoj kaj eminentuloj.

Kunklude mi dirus, ke ĝi estis tre bone organizita kongreso fare de la sindonema Esperanto-grupo de Frajburgo. Ĝi certe ankaŭ meritis esti Esperantujo, por la plezuro de ĉiuj samideanoj, ĉefe el eksterlando.

* ni amike avertas niajn legantojn, ke pri tiu stranga(?) titolo kulpas la redaktoro sed ne nia raportinto A. Grossmann!

INTERNACIA JUNULARA SEMAJNO



**INTERNACIA
JUNULARA
SEMAJNO**

En Szodliget je 30 km norde de Budapeŝto en Hungario okazis tiu tre interesa kaj agrabla feria aranĝo de la 3-a ĝis la 9-a de aŭgusto. Preskaŭ 200 gejunuloj el dudeko da landoj partoprenis ĝin por ĝui ripozan somerumadon en bonetosa Esperantista medio.

Kvankam tiu aranĝo estis specife por gejunuloj, ĉeestis ankaŭ kelkaj ne-gejunuloj aŭ pli bone dirite eks-gejunuloj, ĉar kiel prave tion menciis la organizantoj: *juna estas tiu, kiu sentas sin tia...* Ni ĝin partoprenis kvarope, kun du niaj gefiloj, 16- kaj 18-jaraj, kiuj libere elektis sian programon kaj aparte loĝis en seslitaj lignaj dometoj kun aliaj gejunuloj. Ni-mem loĝis en komforta du-lita ĉambro, sed ankaŭ eblis loĝi en propraj tendoj. La tuta ripozejo estis ĉe la bordo de Danubo.

La programo estis tre ampleksa kaj diversa, nur la horaro ne estis ofte respektata. Oni prezentis al ni folklorajn hungarajn kaj cigajn dancojn, kaj eĉ dancigis la feriantoj. Okazis prelego-diskutoj pri la okulfrape ŝanĝiĝanta Orient-Eŭropa politika sceno. Pri Pollando, ni eksciis, ke la pola zloto fariĝis konvertebla valuto, almenaŭ en la lando-mem. En Hungario, la lando reorganiziĝas, entreprenoj, vendejoj, hoteloj, restoracioj privatiĝas, sed laŭ la enloĝantoj la prezoj multe altiĝis. La hungara forinto fariĝis duon-konvertebla valuto. Tio signifas, ke por privatuloj la konvertebleco estas limigita. Krome por anoj de pluraj okcidentaj landoj la vizo jam ne estas necesa. En Sovetunio ŝajne multaj enloĝantoj jam ne ŝatas la politikon de Gorbaĉof, eble ĉar verŝajne en la ĉiu-taga vivo malmulto ŝanĝiĝis, krome dezirante kontentigi ĉiujn, li fakte kontentigas neniun. Tiel okazis diversaj diskutoj, kaj ankaŭ pri la Esperanto-movado en Litovio, en Ukrainio, en Hungario ktp.

Ankaŭ eblis spekti kinofilmon en Esperanto kun la titolo *Ie en Eŭropo*, krome oni montris diversajn video-dokumentfilmojn sinkronigitajn al Esperanto. Aparte ŝatata estis la tre ĝinda koncerto tute en Esperanto prezentita de katalunaj gitaristo-kantistoj. Sed la organizantoj sukcesis ege lerte aranĝi inter la partoprenantoj 6 grupojn. Ĉiu grupo partoprenis diversajn ludojn kaj konkursaĵojn. Pro tio estis multe pli facile interkontiĝi kun novaj samideanoj. La konkursaĵoj estis plej diversaj: prezenti skeĉon, kanton, aranĝi homan monumento pri Esperanto (*malfacila tasko, sed poste evidentiĝis, ke iuj grupoj havis interesajn ideojn*), ktp. La vesperoj plej ofte finiĝis per dancoj, ĝis ege fru-matene, ĉu ĝis la dua, la tria, la kvara, aŭ eĉ la kvina? tion mi fakte ne scias, ĉar tiam mi jam dormis.

Ni ankaŭ ricevis informojn pri la Universala Kongreso en Kubo dank al Bulgaroj, kiuj jam estis revenintaj de tie. Ili ne nur partoprenis Universalan Kongreson sed ankaŭ IJK-on la Internacia Junulara Kongreso. Ili emfazis kiom-grade la tiea politiko estas ĉie videbla kaj klarigis la kompleksan konsistemon uzatan al eskterlandanoj laŭ ilia deveno; ĉu okcidento, ĉu orientaj landoj aŭ eksorientaj landoj, (*kiujn, iuj ŝatus nomi soclandoj*), ĉu studentoj, ĉu diplomatoj. Ni eĉ povis spekti kelkajn diapozitivojn pri la kongreso kaj Kubo.

Tiu aranĝo estis vere agrabla kaj simpatia, mi povas ĝin rekomendi al ĉiuj gejunuloj kaj eĉ al eks-gejunuloj.

A. GROSSMANN

Aliĝilo

BERGENO



76-a UNIVERSALA
KONGRESO
DE ESPERANTO
27-a julio - 3-a aŭgusto 1991
Bergeno, Norvegio

Konstanta adreso: 76-a UK de Esperanto
Nieuwe Binnenweg 176
3015 BJ Rotterdam, Nederlando
Poŝtĝira konto: 62 73 37 (Centralo Den Haag)
AmRo Bank, Rotterdam: konto 42.69.01.444

Adreso de LKK: 76-a UK de Esperanto
Boks 3160, Arstad
5029 Bergen, Norvegio
Poŝtĝira konto: 0824 0753600
Den Norske Bank: konto 5201.23.41555

ĈIU ALIĜANTO UZU APARTAN ALIĜILON, FOTOKOPION AŬ SAMFORMATAN PAPERON - BONVULU
TAJPI AŬ SKRIBI PRESLITERE. LAŬBEZONE METU KRUCON EN LA KONCERNAJN KVADRATETOJN

FAMILIA NOMO VIRO/VIRINO
(por alfabeto ordigo) (forstreku unu)

PERSONA NOMO UEA-KODO

KOMPLETA POŝTA ADRESO (nacilingve en latinaj literoj kun poŝtkodo)

LANDO TEL. N-RO
(en Esperanto) (kun prefikso)

PROFESIO / FAKO

SATOKUPO NASKIĜDATO

Mi aliĝas al la Kongreso laŭ la kondiĉoj presitaj sur la dorsa flanko;
mi sendas ĉi tiun aliĝilon kaj samtempe pagas laŭ la ĉi-suba specifo al:
 mia landa peranto CO en Roterdamo LKK (nur por norvegoj)
per: poŝtmandato poŝta ĝiro banka ĝiro aŭ ĉeko, aldonante 25,00 gld.
aŭ: Bv. debeti mian UEA-konton (se kredita).
 Mi ne povas jam aliĝi pro pasportaj aŭ transpagaj problemoj. Mi promesas pagi tuj post mia
alveno en la kongresejo laŭ la tarifo de la lasta aliĝperiodo.

Mi legls, komprenas kaj akceptas la kondiĉojn sur ĉi tiu aliĝilo.

DATO SUBSKRIBO

Por uzo de la administracio		KOTIZO (en kategorio)
uea-membro paginta por jaro		ADOPTA KASO
konfirmo de peranto:		BLINDULA KASO
konfirmo de CO:		TRIAMONDA KASO
PAGO EN CO	KONFIRMO	LITERATURA KASO
nomoj		DONACO (ĝenerala kaso)
		ADOPTAJ GEPATROJ
		BANKKOSTOJ (25,00 gld.)
		ENTUTE (en gvidenoj)

Se vi aliĝas kiel kunulo, bv. ĉi tie indiki la nomon/kodon de la ĉefaliĝinto

Se vi aliĝas kiel handikapulo, bv. ĉi tie indiki vian handikapon

Se vi aliĝas senpage, bv. skribi ĉi tie la kialon (vidu dorsflanke)



NIKOLIN' A CHANTE EN ESPERANTO



Une voix tantôt profonde et grave pour évoquer les problèmes du monde de demain, tantôt suave et caressante pour magnifier l'amour-tendresse, une fille blonde vêtue de noir qui chante avec le même enthousiasme les refrains de la "Belle Epoque" et des airs d'aujourd'hui sur des compositions originales, un orgue de barbarie, fidèle compagnon de son périple qui l'a menée de l'Australie au Brésil puis en Europe avant le retour en Wallonie natale... Nikolín' a véritablement ravi au cours d'un récital exceptionnel les espérantophones de Bar-le-Duc et des environs qui l'avaient invitée pour sa dernière prestation en France.

Chanteuse bien sûre mais aussi poétesse-musicienne tout à la fois, meneuse de jeu infatigable qui sait faire partager à son public sa fougue débridée, Nikolín' s'insère de belle façon dans la nouvelle vague des artistes qui ont résolu -souvent à la suite d'une rencontre "coup de foudre" avec une langue musicale par excellence- de s'exprimer en espéranto.

Au côté des groupes rocks qui connaissent de plus en plus de succès dans les rencontres et les festivals internationaux, Nikolín' rejoint avec bonheur une lignée de solistes de renom comme les Suisses Olivier TZAUT et Claude PIRON, le Polonais Georgo HANDZLIK, les Italiens Gianfranco MOLLE, MARCELLA et SUZANNA, la Canadienne Joëlle RABU, l'Américaine Alberta CASEY, les Français Max-Roy CARROUGES et Jack LE PUIL, la Chinoise LIN FANG sans oublier le célèbre baryton bulgare Veselin DAMJANOV pour ne citer que quelques-uns, qui ont définitivement conféré à la chanson espérantiste ses lettres de noblesse.

Nikolin' a regagné Namur pour y peaufiner son futur répertoire avant d'entreprendre une nouvelle tournée vers d'autres continents ... et la promesse de chanter à nouveau à BAR-le-DUC!

===== Esperanto - Rok - Fangazeto ===== ☆

Ĵus aperis n°0 de ROK' GAZET' dediĉita al promocio de modernaj muzikartoj. Ĝin lanĉas "EUROKKA". kiu paralele kreis E°-Rok-Eldonejon "VINILKOSMO", jam proponante 2 disketojn de muzikgrupoj: "AMPLIFIKI" kaj "LA ROZMARIAJ BEBOJ". Jara abonotizo al Rok'Gazet': 29FF aŭ 32 IRK. (4 n°j jare) - Ĉiu anoncita disketo: 29FF + sendkostoj).

Abono kaj mendo ĉe: EUROKKA, F 31450 DONNEVILLE

La kotizoj varias depende de la loĝlando de la aliĝanto, laŭ la Jena grupigo:

A Ĉiuj landoj escepte de tiuj menciitaj ĉi-sekve sub B:

B: Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Germana DR, Hungario, Jugoslavio, Rumanio, Pollando, Sovetunio; ĉiuj landoj de Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Resp.), Afriko kaj Latina Ameriko.

La kotizoj estas pagendaj al la konstanta adreso aŭ al landa peranto (vidu liston en la Unua Bulteno).

POR ELEKTI LA ĜUSTAN KOTIZON BV. ATENTE RELEGI LA ĈI-SUPRAJN KLARIGOJN.

KONGRESKOTIZOJ VALIDAJ ĜIS: (ĉiuj en nederlandaj guldenoj)	90 12 31	91 03 31	ekde 91 04 01
LANDOGRUPO: (tra U.F.E.)			
1. individua membro de UEA (ne inkluzivas MG):	550F	685F	824F
2. ne individua membro de UEA	685F	824F	960F
3. kunulo / junulo / handikapulo, mem individua membro de UEA	275F	412F	550F
4. kunulo / junulo / handikapulo, ne individua membro de UEA:	412F	550F	685F

DIFINOJ

Individua membro de UEA: Dumviva Membro (DM), Membro kun Jarlibro (MJ aŭ MJ-K), Membro-Abonanto (MA aŭ MA-K) en la jaro en kiu oni pagas la kongreskotizon. *Ne temas pri Aligitaj Membroj kaj ne inkluzivas Membrojn kun Gvidlibro (MG)*

Kunulo: Tiu, kiu loĝas samadrese kun la ĉefaliĝinto. Ĉefaliĝinto oni konsideras personon kiu estas individua membro de UEA aŭ kiu pagas kotizon kiu ne jam estas rabatita.

Junulo: Tiu, kiu je la dato 91 01 01 estis pli ol 19 kaj malpli ol 30-jara. Oni nepre notu la naskiĝdaton sur la aliĝilo.

Handikapulo: Tiu, kies handikapo postulas akompananton, kaj kiu povas pruvi tion per kuracista aŭ simila atestilo, sendita kune kun la aliĝilo.

Senpage aliĝas:

- infanoj kaj gejunuloj ĝis inkluzive 19-jaraj je la dato 91 01 01;
- nemalhaveblaj akompanantoj de handikapuloj.

La kotizo ne estas repagebla, senkonsidere ĉu la aliĝinto ne povas partopreni la Kongreson pro propra volo aŭ pro iu ajn ekstera kaŭzo, eĉ se la Kongreso ne okazas, aŭ okazas en alia urbo.

La kotizo ne inkluzivas loĝadon, ekskursojn, bankedon kaj eventuale aliajn aparte pagatajn aferojn pri kiuj informoj kaj mendiloj aperos en la Dua Bulteno.

Kongresaneco ne estas transdonebla al alia persono.

Karavanaj aliĝoj: Grupo de minimume 25 personoj rajtas aliĝi kontraŭ 90% de la kotizo en kat. 1 de la koncerna aliĝperiodo, eĉ se ili ne estas individuaj membroj de UEA. Karavana aliĝo eblas nur por landgrupo A. Petu plian informon ĉe la Konstanta Adreso.

Por la limdatoj kaj aliaj kondiĉoj validas la dato de ricevo de la pago en la CO.

Aliĝilon sen kompleta pago oni ne traktos.

Kongresa Regularo (ekstrakto): "7. Kongresanoj devas fari nenion, kio kontraŭas la Kongresan Regularon, aŭ malutilas al la UK, kaj devas submetiĝi al la leĝoj de la lando, kie okazas la UK." Kiu subskribas ĉi tiun aliĝilon, konfirmas sian respekton por la Kongresa Regularo kaj la laŭstatuta neŭtraleco de UEA, kiu organizas kaj aŭspicias la Universalajn Kongresojn.

**NEPRE SENDU VIAN ALIĜILON
KAJ KOTIZON AL LA SAMA INSTANCO.**

Jon Walter Yung,
Berdoulet Ouest,
F O N T E N I L L E S,
F 31470 SAINT-LYS

27-6-90

Denis, A Komuna letero al Singoroj Y G , E L , Pol
G , D-ro U L B por informo.
Kopie al Singoro A L por informo.

Tre estimataj singoroj,

Mi ne havas la honoron vin koni, sed ricevinte mian sendaĵon

Kai quazau superpremie, tiu nova alfabeto ne plu bezonas la Zamenhofajn supersignojn, ĝiuj estis por ni quazau karcerbuloj jenantai ĉiujn niajn movojn, ĉar ili ekzistas sur neniu mashino!

Karai legantoj de "La Informilo"....

Ĉiu vere vi ne chatuas tiun novaĵon, ĝiam ni devas adopti, por ke la kvar kvaronoj de la homaro dedichu tempom al aktivo de Esperanto ĉie post du au tri jaroj?
Trankviliĝu! Vi rapide akutimigos!

Dezirante al vi bonan ricevon de ĉi tiu materialo, mi restos ĝe via dispono por plial informoj. Ĉiu-okaze mi atendos komentojn de vi kai vin antaŭdankas por tio!

Kun multaj salutoj el Sud-Francio, Via



En Nipono, kiel en pli malpli tiuj landoj, estas diversaj tipoj de lernejoj. Por la plej junaj infanoj ekzistas du tipoj, kiuj nomiĝas HOIKUEN kaj YOOTIEN. Mi opinias, ke ili estas tre similaj. Mi vere ne tro bone scias, kvankam la vorto HOJKEN pli speciale signifas VARTEJO. Tie oni akceptas -se mi ne eraras- infanojn ekde la kvina jaro. Tamen en kelkaj kazoj ili akceptas pli junajn, se, ekzemple, liaj patrinoj tute ne povas gardi ilin en la hejmo, ĉar ili devas labori ekstere. Mi-mem ne estis en tia HOIKUEN, kvankam mi estis 4-jara, kiam mi eniris, ĉar mia patrino laboris en nia butikoj. mi restis tie 2 jarojn.

La vivo tie ne estis tiel simpla! Ni devis surhavi ĉemizojn kaj ŝuojn de tute preciza tipo, kvazaŭ ni estus jam soldatetoj! Terure, ĉu ne? Ni havis ŝranketojn por meti la kolor-kraĵonojn, kiujn ni havis por fari belajn desegnaĵojn...

Kiam mi iris al la vartejo, mi devis kunporti mian rizon kuiritan, ĉar rizo en Nipono estas kiel pano en Eŭropo. Do oni povas diri, ke rizo estas por ni kiel "sandviĉo" por okcidentaj infanoj, sed en la vartejo estis tre simpata kuiristino, kiu preparis la aliajn manĝaĵojn. Mi ankoraŭ memoras, ke ŝia nomo estis UTIDA. Ni do nomis ŝin "UTIDA NO OBATIAN", kiu signifas "Onklino UTIDA"... Tio montras al vi, ke viro neniam forgesas sian unuan amon!

Pri tiu tempo mi havas amuzan memoraĵon: kun la rizo, ni, en Nipono, ofte manĝas "ume". En esperanto ni povas diri "umeo", ĉu ne? Nu, kio estas umeo? Ĝi estas malgranda frukteto, kiu nomiĝas latine "prunus mume" kaj estas simila al la eŭropa "prunelo" (prunus spinosa) sed estas ruĝa.

Nu, kiel vi scias, rizo estas ĝenerale blanka... Antaŭ ol iri al la lernejo, mi bone premis mian rizon en mia gamelo, por ke ĝi fariĝu bele glata, kaj en la centron mi metis unu umeon. Tiel mia rizo -kun la umeo- tute similis la niponan flagon. Kaj mi tre fieris pri tio! Kaj miaj amikoj tre admiris mian patriotismon!

(sekvota)

* NIPONO estas la japana nomo de JAPANIO. La partoprenintoj de nia semajnfina staĝo en BETSCHDORF certe memoras pri Tsukuru ARADA, juna japano (aŭ niponano!), kiu komencis prelegi pri la aludita temo. Bedaŭrinde, pro manko da tempo, li devis kontentiĝi pri eta parteto de sia interesinda rakontado. Ni malfermas plezure al li "La Informilo"-n!

**CONTROLEZ VOS CONNAISSANCES
EN ESPERANTO – Malfeliĉa Prezidanto!
(PAUVRE PRESIDENT !)**

- Kiam li akurate komencas li estas tirano !
- Se li la lastulojn atendas li estas tro tolerema !
- Si li postulas konstantan ĉeeston li estas despoto !
- Se li nenion diras li indifereca !
- Se li parolprenas li fariĝas tedega !
- Se li ĝin donas li sin senbalastigas !
- Se li postulas silenton tio estas povomisuzo !
- Se li lasas reĝi neordon mankas al li aŭtoritato !
- Se li estas firma li tro serioze sin taksas !
- Se li estas tro pacienca li ne sufiĉe estas kompetenta !
- Se li siajn propajn ideojn prezentas oni ilin neeviteble kontraŭas !
- Se li postulas verajn elektojn li ne estas decidema !
- Se li estas dinamika li estas ekcitata !
- Se li restas prudenta li ne estas kapabla !
- Se li ĉion tutsole faras li estas pretendema !
- Se li delegas povon li estas senkuraĝa !
- Se li komplezemas kun la sinjorinoj li estas komplezaĉema !
- Se li tia ne estas li estas orgojla !

LA MALFELIĈULO : al li endas havi la paciencon de l'azen', la flekseblecon de l'kat', la fierecon de l'leon', la kalmon de l'sfinks', la forton de l'elefant', la noblecon de l'ĉeval', la fidelecon de l'hund', la kirason de l'krokodil', kaj la kredon de l'simplula karbist'.

SE HAZARDE EKZISTAS UNU ... KIA HOMEĜO !

humuraĵo senpermeso ĉerpita el bulteno de niaj belgaj samideanoj!

----- KOTIZOJ kaj ABONOJ 1991 -----

Vi povas jam nun pagi vian abonon al **La Informilo** kaj vian Federacian kotizon por la jaro 1991, ne necesas atendi la aperon de la venonta numero de **La Informilo**.

Jen la tarifoj por la jaro 1991:

Abono al La Informilo por enlandaj adresoj	45 FF
Abono al La Informilo por eksterlando	18 Rpk aŭ 57 FF
Federacia kotizo	24 FF
Bankkosto, se vi pagas per bankĉeko el eksterlando	20 FF

Bonvolu ĝiri la koncernan sumon al la poŝtĉekkonto de nia Federacio:
FÉDÉRATION CULTURELLE DE L'EST POUR L'ESPÉRANTO PĈK 1997 72W NANCY
 Aŭ rekte al mia adreso:
 S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM,
 Francio

La Trezoristo

A. Grossmann

=====

EKZAMENO EN ILLZACH

La 28-an de junio 1990 okazis en Illzach ekzamen-sesio por niaj gelernantoj de la parolaj aŭ aliaj kursoj. Ni povas gratuli al la jenaj gesamideanoj, kiuj sukcese trapasis la ATESTON PRI LERNANO.

S-ino Mireille GOUGET	F-ino Daniela WERMELINGER
F-ino Bénédicte SPEISSER	S-ino Barbara SCHURRLE
S-ro Gerald MOUROT	S-ino Titia VANDERLET

===

A. Grossmann

EKZAMENOJ EN LA KULTUR-CENTRO "GRESILLON"

La 14an de julio (!), fine de la unua staĝperiodo, Mireille DILLENCHNEIDER, el la anim-skipo de la klubo de BAR-le-DUC, kaj François-Xavier GILBERT, Direktoro de la Moza Ĉambro de Komerco kaj Industrio sukcese trapasis la parolan parton de "ATESTO PRI KAPABLECO, fronte al internacia ekzamenantaro kaj sekve rivevis sian diplomon.

Sinceran gratulon al ĉiuj laŭreatoj!

===

P. Denis

EKZAMENO EN NANCY

Fine de junio okazis ekzameno en NANCY ("Atesto pri Lernado" - 1a-grada)
 El 4 kandidatoj, 3 brile sukcesis:

Alain COLLIGNON (cito "tre bone")
 Véronique MASSON (cito "bone")
 Guy GEOFFROY (cito "bone")

varman gratulon al la tri!

J.-P. Colnot

L A N D E G G A C A D E M Y

INSTITUTE OF INTERNATIONAL EDUCATION AND DEVELOPMENT

Niaopinie jen interesa aranĝo, proponata de NE-ESPERANTA CENTRO, kie oni povus pruvi ĉeestante la staĝon, la netakseblan valoron de la aŭtentika tutmonda lingvo!


INVITO: Esperanto-Semajnfino por E^o-parolantoj
 Temo: "Paŝoj al Tutmonda Socio"

PETU TUJ ALIĜILON ĈE:
 Landegg Akademio
 CH-9405 WIENACHT
 Tel.: 0041-71-912233

26/28ajn
 de oktobro 1990

Esperanto-Fako

INGEBORG WEIGELT
 Richentalstr. 8
 D-7750 KONSTANZ
 Tel. 07531 / 15 328



EL NIA MALFERMITA LETERKESTO...

INTERESA RESTADO
ĈE IA LŬAR'-KASTELO...

"Dum du semajnoj, Z. restadis en ia fama kastelo, kie regas stranga miksaĵo da kursoj, ripozo kaj "senlaboruloj". Tiuj "senlaboruloj" estas vere la plej strangaj homoj de tiu kastelo: ili plej multparte malbonfartas...

Pri la infanaro, Z. apenaŭ aŭdacis paroli, ĉar temas pri infanoj de 7 jaroj ĝis la fino, kiel en la kanzono. Tamen, Z. havis la kuraĝon improvizi kurson por divers-specaj infanoj, kaj eĉ organizi spektakleton por la cetera publiko.

Z. ankoraŭ ne havis la kuraĝon paroli pri ekskurso al ANGERS, kiun ni vizitis haste dum du horoj, trakurante la kastelon de la reĝo RENATO, fame konata en Loreno, la katedralon kaj finfine la domon de Adam kaj tuj, tuj reen al tiu fama kastelo.

Tiu kastelo havas ege ĉarmajn gedommastrojn, sed ili eble estas tro toleremaj. Diversgradaj kursoj ek-aperas subite, kaj finas samtempe kiel la restado de la kursgvindanto, aparte pri "konversacia rondo" gvidata de iu nekonata anglo kun aĉa akcento.

Nur en la butikoj oni trovas iom da freŝeco kaj ripozo kun afabla akcepto, kiu trankviligas tiun strangan "faŭnon".

Z. vere rekomendas al vi restadon en tiu LUAR'-kastelo, kiu ebligas al vi resaniĝi komplete".

ZIPO

"... La fakto okazigi Universalan Kongreson en Kubo estas en si-mem laŭdenda. Simplaj esperantistoj, iu ajn estu ilia lando, kaj iu ajn estu la politika sistemo en tiu lando, rajtas esti ankaŭ "agnoskitaj" de Universala Esperanto-Asocio, tipe neŭtrala, kiel ĉiu scias... Ili ne respondecas, eĉ se ekzistas demokrata balotado, pri agoj, diroj aŭ sintenoj de la ŝtatestro.

Tamen oni povas sin demandi, ĉu la emfazita ĉeesto de Fidel Castro dum la oficiala inaŭguro -kun "varma aplaŭdo" de la kongresanaro- kaj lia rimarkigita manpremo al 150 elektitaj kongresanoj alportos ion specife fruktodona al Esperanto..."


Kandido

Verŝajne eĉe al artikolo de B. AUNIS, aperinta en nia lasta n°...

"... Kiu plendas, ke la esperantistoj batalas pri gramatiko kaj ne penas por la komprenado de la aliaj homoj? Mi opinias, ke tiu batalo estas bedaŭrinda sed neevitebla. Eĉ parolante la saman lingvon, la homoj ne povas (aŭ ne volas) kompreni siajn samlingvajn najbarojn!... Kial la esperantistoj estus apartaj?

Mi pensas, ke ni devas eviti la tro egan optimismon kaj la tro egan pesimismon... En la mezo, la vero".

Ginette MARTIN




☆☆☆

Grazina kaj Jean-Luc THIBIAS ĝoje informis nin pri la naskiĝo de Mélanie!

Rapidan (normalan!) kreskiĝon ni deziras al la unua denaska E°-parolontino!

☆☆☆



KRUĈVORT-ENIGMO

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11	12
1												
2												
3												
4												
5												
6												
7												
8												
9												
10												

HORIZONTALE

1 detektilo - templo. 2 hispana fluvo (Radiko) - malofta - Japanio (r). 3 preskaŭ agrable - memorenda (r). 4 anonimulo - juvelero - vizitenda ejo. 5 departemento (Fonetike) - pronomo - skribilo. 6 likviĝinta vaporo (r) - reciproka dependeco (r). 7 havi ideon pri io - en... aŭ elirejo (r). 8 soldataro - metalo (r) - adverbo. 9 sin submeti al ordono - parto de motoro - el riĉa metalo - pagilo (r). 10 financoficejo - grupo - eŭropa civitano.

VERTIKALE

1 soldataro. 2 itala montaro (r) - islamana. 3 ornamo per longa ŝtofo - ligilo (r). 4 juna arbo - fidinda kunulo (r). 5 birdo (r) - aŭdacŝatanta. 6 korpa organo (r) - lando. 7 manĝaĵo - komerca kalkulo. 8 nenormalaĵo - vestaĵo (f). 9 parto de gitaro - floro - sufikso. 10 sub graveca influo - senkonscie ripozi. 11 malavara en nomo de sudamerikaj urboj. 12 sur maro - oficiala laŭdaĵo.

SILABENIGMO

Pere de la ci-subaj alfabete ordigitaj vorteroj, malkovru la vortojn, kies difino troviĝas dekstre. La du krucumitaj kolumnoj, vertikale legataj, elformas proverbon.

aho al ao dro eo er fra go ik in is ker lik lo lo mu naŭ ne ni no no no ob od ono pa pe po po ren rio se sko si tri to ut va ver vib

1	+ - - + - -	antikva aventuro
2	+ - - + - -	Japanio
3	+ - - + -	religia pentraĵo
4	+ - - + -	kernofrukto
5	+ - - + - -	malsano de sekalo
6	+ - - + - -	moviĝema bakterio
7	+ - - + -	korana dio
8	+ - - + - -	kalika folio
9	+ - - + - - - -	puŝfaligi
10	+ - - + - - -	iom kliniĝanta
11	+ - - + - - -	organo el fibroj
12	+ - - + - - -	eniĝi profunde
13	+ - - + -	malsupra
14	+ - - + -	muzikintervalo
15	+ - - +	japana versformo
16	+ - - + -	fruktograjno

SOLVOJ DE LA LASTAJ ENIGMOJ (n° 70)

Krucvort-enigmo: fajf mergi se iperit uazo
determino li eriko onklet tavol avino
akcel epokoj viand silabe apr tatuo sen
rembur etos eolo oliv al erar noda rip
Silab-enigmo: Kiu semas venton rikoltos
fulmotondron.

... lastminuta informo:

"La franca satelito Iksigrekozedo paneas..."
Ne gravas... Dua ĉiam pretas..."



- La bufo grimpis tri ŝtupetojn supren.
Skribu: "El internaciaj meteologiaj observoj kaj el la indikoj de meteologiaj satelitoj evidentiĝas, ke vasta zono de alta premo translokiĝas de super la Arkta maro trans Skandinava duoninsulo super Centran Eŭropon. Sekve de tio en la sekvaj 24 horoj ni povas atendi belan kaj varman veteron..."

Stano Markoviĉ